**Éva Farkas-Tatar** (23. septembro 1924 – 23. novembro 2018)

Kion mi volas diri unue aŭdinte la informon pri la forpaso de "Onjo Éva" estas danko, danko al ŝi kaj precipe danko al Dio pro tio, kion ŝi donis al ni, kion ni ricevis de ŝi dum multaj jaroj.

Mi renkontis ŝin kun la edzo en la jaro 1979. Mi estis kore akceptita en ilia apartamento en Dohany utca. Ili montris al mi la urbon, la preĝejon, la lagon Balatono kie mi renkontis kelkajn junulojn el la paroĥo. Poste mi kunportis ilin ambaŭ al Svislando por la Universala Kongreso en Luzern kaj la KELI-kongreso en Bienenberg, kaj ankaŭ ĝis mia franca vilaĝo kaj ĝis la trajno kiu tra Parizo portis ilin hejmen. Laŭ mia memoro, József lernis Esperanton kaŝe de ŝi kaj surprize parolis la lingvon en la kongresoj. Kun mi li unue babilis france.
Mi alian fojon restis ĉe ŝi, sed ne memoras ekzakte la daton, ĉiam akceptita kun ĝojo.
Rimarkeblaj estis ŝiaj profunda fido kaj konvinkita ekumenismo. Ŝi lasis fortajn spurojn en Esperanto-medioj en instruado kaj radio-elsendoj en Hungario kaj eksterlande. Tiuj kiuj partoprenis kristanajn Esperanto-kongresojn kie ŝi estis ne povas forgesi ŝin kaj ŝian afablecon.

En niaj kongresoj, ŝi gvidis bibliajn diskutojn tre ŝatatajn, sed ankaŭ lingvajn diskutojn. En kongreso kie ŝi ne ĉeestis, Henk de Hoog diris ke la gramatikaj tempoj estis tiam gviditaj de pluraj "adamoj" ĉar forestis Éva.

Mi memoras, kaj ĵus reaŭdis, ŝian voĉon, en klara Esperanto. Notindaj estis kelkaj trajtoj, kelkaj esprimoj tipaj de ŝi : "*Esence*", kaj "*ĉe ni kutimas diri*". Mi kun emocio reaŭskultas la intervjuon kiun ŝi donis al Radio Vatikana en 2007. Aŭdante ĝin, mi revidas ŝin, kvazaŭ ŝi troviĝus malantaŭ la vitro de la registrejo.

En la alia mondo kiu venos, kie ne plu estos lingvaj problemoj, ni ne plu diskutos pri teologio, ne plu pri gramatiko, sed ŝi estos partoprenanto kun ni en la ĥoro kiu laŭdos Dion.

*Philippe Cousson*

Ŝia intervjuo kun Carlo Sarandrea